

Eŭropa Esperanto-Centro

Sekretariato de Eŭropa Esperanto-Unio

Bruselo 1977 12 15

Al UEA estraro kaj CO
la Landaĵ Asocioj, kies
lando apartenas al la
Eŭropa Komunumaro

PI al Esperanto-gazetoj kaj
Radiostacioj

PI al koncernaj personoj

Estimataj Samideanoj,

Pro diversaj kialoj - ne estas ĉi tie la loko por prijuĝi ilin - la "Eŭropa Esperanto-Centro", kreita en 1973 okaze de Eŭropa Kongreso en Luksemburgo, devis agadi en malfacilaj kondiĉoj. Ni devas tamen substreki la ampleksan kaj tre ofte sukcesan laboron farita tra la jaroj de s-ino J.H. HOEKSTRA-SIEDERS el Schoorl, administrantino de la Centro.

Okaze de la UK en Hejkjaviko, la kunveno por Eŭropo, en kiu ĉeestis reprezentantoj de landaj asocioj kaj fakuloj pri eŭropaj aferoj, decidis, laŭ propono de G. Leon-Smith, starigon de "Eŭropa Esperanto Unio". Tiu organizo agos kvazaŭ tegmenta asocio de la landaj asocioj, kies lando estas membro de la Eŭropa Komunumaro. Ĉin gvidos instanco kunmetita el la prezidentoj de tiuj landaj asocioj (laŭvico unu funkcios kiel prezidento de la Unio, la aliaj kiel vic-prezidentoj).

Laŭ impulso de UEA, en la kadro de ĝia regiona agado, estas restrukturita la "Eŭropa Esperanto-Centro", kun sidejo en Bruselo, kiu disponas pri propraj oficejoj kaj salaĵrita funkciulo. Tiu formaĵo, kiu iĝos (de la belga ŝtato) rekonata "asocio sen profita celo", nomiĝos:

EUROPA ESPERANTO CENTRO, SEKRETARIATO DE EUROPA ESPERANTO UNIO.

Laŭlege ĝin devas gvidi unu konsilio kaj unu administrantaro.

La taskoj de tiu sekretariato estas: respondi al leteroj, distribui cirkulerojn, prizorgi kontaktojn kun la instancoj kaj organizoj en Bruselo kaj funkciuloj de la Esperanto movado, informi la Esperanto gazetaron, aranĝi la kunsidojn, prizorgi ĝeneralajn sekretariajn laborojn ktp.

Financajn rimedojn por vivi en la Centron antaŭvide liveros: kontribuoj de UEA, lokaj organizaĵoj, landaj asocioj kaj subvencio de oficialaj instancoj. Jam okazis preparkunveno. La oficiala fond-kunveno okazos plej eble baldaŭ.

En sia strebado por rekonado de Esperanto en la sfero de Eŭropa Komunumaro la movado tiamaniere donas al si la instrumenton por sistema, kunordiga kaj, ni estas certaj, fruktodona laboro.

Sincere via

D-ro P. DENOEL, prezidanto
EUROPA ESPERANTO UNIO

KONVENCIO

- 1) La Esperanto-Asocioj de la landoj apartenantaj al la Eŭropa Komunumaro ("Komuna Merkato") decidas kunordigi sian agadon por enkonduko de la lingvo internacia ESPERANTO en la Eŭropajn Instituciojn.
- 2) Tiucele estas kreita "Eŭropa Esperanto-Unio", kies gvidadon plenumos honorofica instanco, kunmetita el la prezidantoj de la supre cititaj landaj asocioj - laŭvice unu funkcianta kiel prezidanto de la Unio, la aliaj kiel vic-prezidantoj.
- 3) Sur la teritorio de la E.K. ĉiu poresperanta agado kun internacia eŭropa karaktero estos farata sub la eksplicite formulita aŭspicio de la Unio. Pri la aktiveco de tiu Unio solidare kaj ekskluzive kompetentaj la asociiĝintaj landaj asocioj.
- 4) Estas konsentite pri malfondo de la "Eŭropa Esperanto-Centro", kreita en 1973 okaze de la Eŭropa Kongreso de Luksemburgo.
- 5) La Unio kunlaboras kun la samcelaj centroj en Strasburgo kaj en Luksemburgo.
- 6) La Unio rekonas kiel sian sekretariaton la societon sen profita celo "Eŭropa Esperanto-Centro", kies sidejo estas en Bruselo kaj kiu disponas pri propra oficejo kaj rekompencita funkciulo. Tiu centro, samtempe reprezentanto de UEA en la sfero de la Eŭropaj Institucioj kaj de la neregistaraj internaciaj organizoj kun sidejo en Bruselo, havas kiel esencan taskon prizorgi la necesajn rilatojn inter tiuj institucioj kaj organizaĵoj kaj la Esperanto-movado.
- 7) La Unio partoprenos en la financaj rimedoj de tiu Centro pere de jara subvencio laŭ propra decido tiurilate.

Dato:

Subskribo(j):